

FINNA ESPERANTISTO

OFICIALA, MONATA ORGANO

de

ESPERANTO-ASOCIO de FINNLANDO

(N:ro 8) Provnumero

NOVEMBRO 1907

Jaro 1:a

ABONPREZO: Jare Sm. 1: 20 (Fmk 3: —) ¹ / ₂ -jare " 0: 70 (" 1: 75) Unu numero " 0: 10 (" 0: 25)	REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO ILAREJO ESPERANTISTA HELSINKI FINNLANDO HELSINGFORS	ANONCPREZO: 4 sd. (10 pennoj) por ĉiu milimetro. Por 3, 6, 9 aŭ 12 enpresoj, respektive 10, 15, 20 aŭ 25 % ^o -a rabato.
-----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------	----------------------------------------------------------------------------------------------------	----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------

ATENTU!

Por la jaro

1908

Finna Esperantisto

~~estas abonebla en ĉiuj poŝto-~~
ficejoj en Finnlando.

Prezo por jaro Fmk. 3: —
por ¹/₂-jaro " 1: 75.

ATENTU!

ESPERANTO ANTAŬ JUĜEJO DE SCIENCULOJ.

La saksa Societo de Sciencoj adminis la lastan printempon du el siaj membroj, nome prof. *Brugmann* kaj *Leskien*, verki por la Societo skriban kritikon pri la movado por enkonduko de lingvo internacia. Por plenumo de la peto la du scienculoj publikigis broŝureton, en kiu ili prijuĝas „artajn lingvojn tutmondajn“ aŭ, alivorte, kontraŭbatalas Esperanton tiel mallerte kiel limigitaj prudentoj kutimas.

La nomita broŝureto ne restis sen respondo. *Doktoro Borgius*, laŭ siaj propraj vortoj esperantisto, prijuĝis iliajn dirojn kaj dubojn pri nia lingvo en tre interesiga broŝuro, nomata germane: „*Die Weltsprachen-Bewegung vor dem*

Forum sachverständiger Kritik“ (esperante: La movado por lingvo tutmonda antaŭ juĝejo de kompetenta kritiko). Laŭ tiu-ĉi lasta publikigaĵo ni provas mallonge prezenti la vidopunkton de la du koncernataj kontraŭuloj.

Pri prof. *Brugmann* oni povas diri, ke li almenaŭ provas esti senpartia rilate al Esperanto. Li konfesas, ke nenia viva aŭ malviva lingvo taŭgas por internacia uzado. Tial restas por esplori, ĉu ia arta lingvo, kiu ankaŭ laŭ li estus pli facile ellernebla ol la naciaj, ŝajnas fariĝi tutmonda. Sed „nenia ellaboraĵo ankoraŭ atingis veran praktikan sukceson“! Tio-ĉi estas stranga. La honorinda profesoro sekve ne ŝcias, kian sukceson jam havis Esperanto! D:ro *Borgius* estas prava rimarkante, ke la sukceso de Esperanto plene pruvis la taŭgecon de arta lingvo por ĉiufanka praktika uzado. Kiel ajn mankhava estus Esperanto, tamen estas certe, ke ia arta lingvo kontentigos la postulojn, kiujn ni metas al internacia esprimito.

Plue prof. *Brugmann* konstatas, ke kompetentuloj aŭ lingvistoj ĝenerale ne aliĝis al la esperantismo. Des pli bedaŭrinde! Sed aliparte tio-ĉi ne estas grava. Estas ja vere, ke grandaj progresoj de la homara civilizacio estis iniciatataj ne de dubemaj scienculoj sed de kredemaj entuziasmoj kaj ke la antaŭaj nur poste sin okupadis pri detaloj de iniciatita afero malgraŭ iliaj duboj. Ni do esperu, ke scienculoj esploros kaj disvolvos ankaŭ Esperanton, kiam ĝi estos ilia propra lingvo.

Brugmann ankaŭ rimarkas, ke ĉiuj lingvoj iom post iom aliformiĝadas kaj ke sekve Esperanto, ne havanta hejmlandon, kies loĝantoj povus ankaŭ en estonteco montri kaj difini, kia devas

esti la ĝusta Esperanto, pro tiu-ĉi manko baldaŭ disfalos en nombregajn dialektojn aŭ apartajn lingvojn. Vana timo! Se ia internacia akademio, ĉiujaraj kongresoj aŭ konstanta internacia uzado ne povos gardi nian lingvon kontraŭ la nomita danĝero, oni certe trovos aliajn rimedojn. Oni eble efektigos, kiel d:ro *Borgius* rimarkas, tiel nomatan „Fondajon por internacieco“, t. e. sidejon por ĉiuj internaciaj institutoj, kie multaj miloj da homoj uzus inter si kompreneble nur Esperanton. Ni aliaj povus imiti ilian lingvaĵon kaj tiel Esperanto ĉiam restus unu. Aliparte estas klare, ke la devo kompreni unu la alian ankaŭ devigas paroli saman lingvon.

La alia kritikisto, prof. *Leskien*, en treprenis montri „la plenan malsukceson“ de la interna konstruaĵo de Esperanto. Li pretendas esti sufiĉe studinta la lingvon por prijuĝi ĝian gramatikon kaj vortaron. Ni citu ekzemplon. Li el-lernis la diferencon de „pordo“ kaj „pordego“ kaj klarigas, ke „pordego“, estas „granda pordo“. Sed, miras li, se okazas, ke la „pordego“ estas malgranda aŭ ke la „pordo“ estas granda, kie do ĝin esprimi? Ho sankta simpleco! „Pordego“ estas alio ol „granda pordo“ ĉar la sufikso „eg“ plifortigas, ne nur la eksteran amplekson, sed la ideon mem de la koncernata objekto. Sekve oni povas diri: (mal)granda pordego, (mal)granda pordo. Ankaŭ estas eble, ke ia pordo estas pli granda ol ia pordego.

Tiel same suprajaj kaj mallertaj estas liaj ceteraj rimarkoj pri la kvazaŭa sentaŭgeco de Esperanto. Al ni esperantistoj li ne scias prezenti ion novan aŭ gravan.

D:ro *Borgius* rakontas en sia broŝuro ankaŭ pri amerika profesoro *Wiener*,

kiu en ia semajna ĵurnalo esprimis sian opinion pri Esperanto, sed ĉar tiu-ĉi „scienculo“ sin montras tro aroganta kaj mallerta, ni tute ne tuŝetu lian vidopunkton.

Werner Anttila.



AL LA PLIBONIGEMULOJ!

(Represata el „Lingvo Internacia.“)

Lasu la lingvon, kia ĝi estas!
Ne „plibonigu“ ĝin peno kritika!
Kvankam terminoj dubaj eĉ restas,
En si mem estas ĝi do fortika.

Sed konstruaĵon daŭre skuante
Fine alvenos per vi la momento,
Kiam pro viaj batoj tremante
Ĝi ŝanceliĝos ĝis fundamento!

Pensu, ke lingvo estas vivanta
Inter la homoj; pro tio ĝi devas
Esti uzata de ili, kreskanta
Laŭ la bezono — ne kiel vi revas!

Lasu la lingvon — taŭga ĝi estos,
Kiel ĝi taŭgas jam por iu celo:
Certe nur tial forta ĝi restos,
Ĉar forta gardos ĝin nia fidelo!

L. E. Meier (München).

Komentario.

Grupo de Esperantistoj diras *sisteme* „rogi“ anstataŭ „peti“, alia grupo diras „sani“ anstataŭ „farti“ kaj tria grupo diras „eksidi“ anstataŭ „sidiĝi“.

En Cambridge tamen — se oni esceptas ilin — ĉiuj Esperantistoj uzis, laŭ ĉiulingvaj eldonoj de Fundamento, la vortojn *peti*, *farti* kaj *sidiĝi*.

Ĉu per si mem estas grave diri *sani* aŭ *eksidi*, kiuj estas vere esperantaj, kaj eĉ *rogi*, kiu povos iĝi esperanta?

Tute ne, kaj ilia uzo povus eĉ esti pliboniĝo!

Sed la demando estas absolute ne, ĉu ili estas pli bonaj ol aliaj, sed ĉu *sisteme*, *didaktike*, oni devas enkonduki ŝanĝojn en la lingvon, ĉu tiamaniere oni alportas profiton al la lingvo aŭ oni fine riskas ĝin pereigi, detruante nian unuecon.

La graveco de la afero ne kuŝas en *privata*, persona uzo de tiu aŭ alia dirmaniero aŭ neologismo; sed tio estas grava, se oni intencas *sisteme*, *didaktike*, anstataŭ per ili la ĝis nun uzitajn Zamenhofajn esprimojn.

Eĉ se persone, se *teorie*, mi opinias,

ke unu el tiuj formoj estas preferinda, mi tamen ne havus, kiel profesoro, la rajton altrudi ĝin al lernantoj aŭ kunlaborantoj, kiuj preferas la „fundamentajn“ esprimojn.

Certe, kiel ĉiuj vivaj lingvoj, Esperanto evolucios. Sed tia evolucio devas esti *natura* kaj ne povas esti la rezultato de *teoria*, *sistema* ŝanĝo. Persone, private, en Esperanto, kiel en mia patra lingvo mi povas uzi neologismojn aŭ specialajn dir- aŭ skrib-manierojn, kiujn mi nepre bezonas por esprimi miajn ideojn.*) La Esperantistoj imitos min aŭ ne imitos min. Se la plimulto min sekvos, iom post iom, la nova esprimo „eniros“ en la lingvon; se ne, ĝi malaperos.

Nur per *tia* maniero, per *natura*, per *libera* maniero estas ebla **nun** la evolucio de nia lingvo. La teoriistoj, kiuj klopodos kaj penos por altrudi *devigajn* plibonigojn, rompiĝos kontraŭ la saĝa firmeco de la Esperantistaro... se ne, Esperanto pereos, aŭ ni havos diversajn „Esperantojn“, kiel ni jam havas diversajn stenografajn sistemojn aŭ, por la blinduloj, diversajn reliefalfabetojn!

La neceseco esti ĉiam komprenata kaj la moderiganta, „normaliganta“ agado de la Lingva Komitato plene sufiĉas, por ke la danĝero de anarĥia stato tute ne estu timinda.

Ni do **ĉiuj** forlasu bonkore sur la altaro de nia necesa unueco niajn *sistemajn* reformojn, kaj, kiel diras la poeto, Esperanto restos forta:

„Ĉar forta gardos ĝin nia fidelo!“

Th. Cart.

Membro de l' Lingva Komitato.



LA TRIA UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO

en Cambridge. Aug. 12—17 1907.

(Daŭr.)

Vendredon, la 16:an de Aŭgusto. S:ro Rektoro Boirac, prezidanto de la lingva komitato, legis raporton pri la laborado de la komitato dum la pasinta jaro. Korektitaj estis kelkaj eraraj tradukoj en la Universala Vortaro kaj en preparo

*) Mi povas eĉ erari, *kiel mi eraras en mia patra lingvo*, sed tio ne estas motivo sufiĉa, por ke oni ŝanĝu la lingvon, tiamaniere ke la eraro ne plu estu la mia sed... de la lingvo!

estas listo de vortoj, kiuj ofte troviĝas en la esperantista literaturo. Tiu listo estos publikigata kiel aldono al Univ. Vort. Ankaŭ teknikaj vortaroj estas en preparado. La L. K. malkonsilis la uzon de sintezaj formoj, kiel ekz. amatas, amitus, k. t. p.

Anoncata estis la fondiĝo de la jenaj internaciaj societoj: „Societo por malhelpi kruelecon kontraŭ bestoj“ kaj „Ligo por helpo al virinoj vojaĝantaj.“ Fondiĝis ankaŭ „Muzika Societo“ sub prezido de S:ro de Menil. D:ro Leono Zamenhof proponis kreon de esperantista aktoraro, por fari teatrajn prezentadojn en Esperanto en ĉiuj pli grandaj urboj de l' mondo. S:ro Whitaker (Anglo) proponis ke estu elektita „Esperanto vilaĝo“, kien Esperantistoj de la tuta mondo povus veturi dum siaj libertempoj. Pri tiu demando ni parolos en speciala artikolo.

S:ro de Beaufront proponis ke la kongresanoj esprimu siajn korajn dankojn al la Urbestro kaj la Civito de Cambridge pro ilia kompleza invito kaj akcepto. Li ankaŭ proponis dankesprimon de la esperantistaro al S:ro Höveler (Ĉefeĉ) por la eldonado kaj disvastigado de la „ŝlosiloj“.

Fine Kolonelo Pollen je la nomo de la kongreso tutkore dankis S:ron Mudie pro liaj senĉesaj penadoj dum la kongreso, kaj ĉiujn, kiuj helpis la aferon.

La ferma kunsido.

Sabaton, la 17:an de aŭg., matene je la 10:a okazis la solena ferma kunsido de tiu vere epokofarinta kongreso.

Estis legata raporto pri la esperantistaj konsulejoj kies nombro estis 203. D:ro Mybs (Germano) proponis ke la vortoj „informisto“ „informejo“ en la estonteco estu uzataj anstataŭ „konsulo“ „konsulejo“. Tiun proponon aprobis la kongreso.

Profesoro R. de Saussure legas raporton pri la Internacia Scienca Asocio. Laŭ propono de tiu asocio, kiu „opinias, ke uzo de sistemo de helpa mono estus tre utila, kaj esprimas la deziron, ke ĉiuj Esperantistoj provu tiun uzon“, la kongreso aprobis la deziron, ke la internacia monsisistemo estu uzata inter Esperantistoj.

Bela fino de la ferma kunsido kaj de la tria kongreso estis la parolo de S:ro D:ro Mayor, la tutmonde konata profesoro de la latina lingvo ĉe la Universitato en Cambridge. Li diris:

„Nur unu vorton al nia honorinda Majstro, la vorton, de Herder:

Neu und freier wird das Herz
Durch besiegte Leiden

Pli juna fariĝas la koro, pli libera
Per venkita malĝojo.

En tiuj ĉi tagoj ni vidis miraklon post miraklo; — Miraklon de komparteco: sub la patra zorgo de Profesoro Cart blinduloj legas, vidas per la fingroj, per la oreloj; — Miraklon de Jeriko: muroj de malfido, de reciproka nescio, falis, dissaltis sub la forta voko de nia Josuo, de niaj Izraelidoj; — Miraklon de Pentekosto: Partioj, Medioj, Elamitoj, Rusoj, Francoj, Germanoj, Poloj, Danoj, Italioj, Svisoj, Hispanoj, Amerikanoj, Angloj, „komprenante unu la alian“, riparante la malfeliĉaĵon de Babelo, fariĝas „unu granda rondó familia“. Tie ĉi la poeto Ovidio ne bezonus plendi:

Barbarus hic ego sum, quia non intelligor ulli.

Tie ĉi mi estas barbaro, ĉar neniu min komprenas.

Ne! post kelkaj horoj kun nia Esperanta lernolibro li ekkrius ĝojege:

Non sum barbarus hic: intelligor omnibus.

Tie ĉi mi ne estas barbaro: ĉiuj min komprenas.

Tial Vivu! Kresku! Floru la nove eltrovita lando Esperantujo, kune kun ĝia nova Kristoforo Kolumbo, kaj la tuta Esperantistaro.

Tiujn ĉi entuziasmajn vortojn la ĉeestantaro rekompencis per longa aplaudado.

Fine D:ro Zamenhof levigis kaj esprimis sian koran dankon al la kongresanoj pro ilia ĉeesto, al la Trio kaj ĉiuj organizintoj de la Tria Kongreso. La kongreso ĝojige atingis sian celon. Ĝi montris al la mondo grandiozan manifestacion. Denove ĝi kunfratigis la diversnaciajn Esperantistojn, kaj fortigis kaj potencigis la Esperantismon.

Poste la tuta ĉeestantaro kune kantis la himnon „La Espero“. Entuziasmaj krioj kaj aplaŭdoj salutis la Majstron. La tria kongreso, neforgesebla, finiĝis.

Festoj kaj amuziĝoj dum la kongreso.

Pro manko de spaco ni bedaŭrinde ne povas pli detale raporti pri la multaj festoj kaj ekskursoj, aranĝitaj dum la kongrestagoj. Jen la ĉefaj.

— Mardon posttagmeze estis aranĝita ekskurso al la Ĝardenurbo en Leitchworth. Ĉirkaŭ 500 Esperantistoj alvenis per speciala vagonaro. Post ekskurso ĉirkaŭ la urbeto sekvis temanĝo, dum kiu la fondinto de la Ĝardenurbo en

interesa bonvena parolado klarigis la celon de la societo, kiu konstruis la urbon. Poste alvenis ankaŭ Sinjorino Zamenhof per aŭtomobilo el Cambridge. Kontentaj je la pasigado de tiu interesa posttagmezo, la ekskursintoj revenis Cambridge'on je la 7:a vespere.

Je la 8:a okazis la unua teatra prezentado en la Nova Teatro. La programon enkondukis muzikaĵoj deklamadoj kaj kantadoj, majstre prezentitaj de kelkaj eminentaj samideanoj, kiel Fino Zablon d'Her, S:ino Rosa Junck, S:ino Mudie, prof. R. de Saussure, k. t. p. La belan vesperfeston finis la konata, gajhumora farso „Boks kaj Koks“, sukcese ludata de S:roj Page, Ford kaj Hulme.

Merkredon posttagmeze okazis milita turniro, kiun ĉenstis D:ro Zamenhof kaj la kongresanoj. Estis ankaŭ aranĝita ekskurso al Ely, kie Pastro J. C. Rust montris la beliaĵojn de la Katedralo.

Vespere okazis dua teatra festo. Ĝi komenciĝis per tre interesa parolado, kun lumprojekcioj, farita de Baronino de Ménéil pri la morala edukado de la popola infanaro. Profesoro Cart deklamis fableton, kiu estis varme akceptata. S:ro Derveaux (Boulogne) sprite kantis la „Esperantan Historion“, kiu atudis la kongresojn, estintajn kaj estontajn, kaj iliajn organizantojn. S:ino Guivy, el Tours, bele kantis „Birdoj forflugu“ kaj S:ro A. Tuffield kantis la melodion „Se doloras mia kor“. Sekvis monologo „Kial ili estas famaj“, tre talente deklamata de ĝia verkinto S:ro Doré el Troyes.

Post mallonga intertempo sekvis la lasta parto de la programo, prezentado de la komedio „Bardell kontraŭ Pickwick“, la plej ridiga afero dum la kongrestagoj. La aktoraro estis vere internacia, apartenante al 9 diversaj nacioj. Jen iliaj nomoj:

Antaŭparolo S:ro. Privat
S:ro. Serĝento Buzfuz J. Pollen (Irlando)
Juĝisto G. Cunningham (Skotlando)
Sam Weller H. B. Mudie (Anglujo)
S:ro. Skimpin (subadvokato por la plendantino) F. Dore (Francujo)

S:ro. Snubbin (advokato por la defendanto) S:ro. Privat (Svisujo)

S:ro. Phunkey (subadvokato por la defendanto) S:ro. Beauchemin (Kanado)
Sinjorino Cluppins S:ro. Rosa Junck (Italujo)

S:ro. Winkle (atestanto) S:ro. Kuhn (Bohemujo)

Ofsisto de la Juĝejo S:ro Pizo (Hispanujo)

Pickwick S:ro. Oscar Browning

Mrs. Bardell Miss Burrell
Knabo Bardell S:ro. Adrian Tuffield.

Ĵaŭdon posttagmeze okazis policanaj sportoj, ĉe kiu okazis D:ro Zamenhof prezentis „Esperantan Pokalon“, donacitan de la Esperantistoj al la plej lerta policano pri ambulanca laborado dum la pasinta jaro, al Serĝento Gates, dirante:

„Mi havas la grandan plezuron prezenti al vi tiun ĉi pokalon je la nomo de la Esperantistaro en la nuna Kongreso kiel signon de la granda lerteco kiun vi montris dum la pasinta jaro pri ambulanca laborado. Vi tion meritas pro via lerteco“.

La populara policano tre modeste akceptis la donacon kaj per kelkaj vortoj varme dankis D:ron Zamenhof.

Vendredon posttagmeze la kongresanoj estis, en la Ĝardeno de la Fratuloj, kore akceptataj de la provincestro kaj Vicgrafino Clifden. Ĉe agrabla muziko de la muzikistaro de la Skota Gvardio kaj la sakfajlistoj, oni gaje pasigis kelkajn horojn en la belega ĝardeno.

Vespere okazis granda naciŝtalo balo en la Urbodomo, kiun ĉeestis anoj de almenaŭ 20 malsamaj nacioj. Inter la pentrindaj naciaj vestoj oni vidis ankaŭ uniformojn de maristoj, militistoj, kaj la oficialajn Universitatajn robojn, francajn kaj anglajn. Dum vigla dancado rapide pasis la tempo kaj nur ĉirkaŭ la tria horo nokte finiĝis tiu neforgesebla festo.

Sabaton la 17:an okazis la festo de „La Revuo“ ĉe kiu estis disdonitaj la premioj de la literatura konkurso, kiun organizis „La Revuo“ dum la lasta jaro. D:ro Zamenhof mem prezidis kaj faris paroladen. Plue parolis Profesoro Bourlet kaj Rektoro Boirac. Prezentataj estis ankaŭ diversaj muzikaĵoj kaj deklamadoj.

Pasintaj estis la Cambridge'aj tagoj. kiujn tiuj feliĉuloj, kiuj ilin povis ĉeesti, certe neniam forgesos. Sed la kongresanoj ankoraŭ ne disigis. Ili veturis al Londono por partopreni en la festoj, kiujn preparis al ili la Londonaj samideanoj. Granda kunveno okazis en „Guildhall“ la Londona Urbodomo, kie la esperantistaro akceptis Ĉefburĝo Sir T. V. Strong en la nomo de Lia Urbestra Moŝto, la „Lord Mayor“, kiu mem estis malhelpata ĉeesti. La plej grava afero en la programo estis la parolado de D:ro Zamenhof. Tiun paroladon ni enpresos en la venontan numeron de „F. E.“.

Post la Londonaj tagoj granda nombro de la kongresanoj partoprenis en ekskurso al Kimrujo, gvidataj de S:ro Mu-

ide. Aliaj veturis Skotlandon, gvidataj de S-ro Page, por viziti la belajn lokojn tie.

Kaj fine hejmen, por sin ripozi ĝis venonta jaro, kiam, ni tion esperu, en ankoraŭ pli granda nombro ni denove renkontiĝos en Germanujo.

Pri la specialistaj kunvenoj dum la kongreso ni raportos en la venonta numero de „Finna Esperantisto“.

(Ĉefe laŭ „Cambr. Daily News“ kaj „Brit. Esp.“ skribis ASomo.)



BIBLIOGRAFIO.

Esperanto avain, finna eldono de la fama Ĉefeĉa ŝlosilo.

Feliĉa estis la ekpenso de S-ro E. Ĉefeĉ komenci la eldonadon de tiuj malgrandaj, sed tamen sufiĉe plenaj „ŝlosiloj“ esperantaj, kiujn ĉiu Esperantisto konas. Kiel grandan utilon ili jam alportis al la movado esperantista kaj kiel multaj estas la homoj, kiuj, dank' al la ŝlosiloj, esperantiĝis! Tiuj faktojn ĉiuj konas, kaj tial ni ne povas esti tro dankaj ol S-ro Ĉefeĉ pro lia iniciativo.

Ĝis nun aperis almenaŭ 9 malsamlingvaj ŝlosiloj, nome la eldonoj angla, franca, germana, hispana, itala, sveda, dana, hungara kaj portugala. Kaj nun ni havas la grandan plezuron aldoni al tiu ĉi nomaro ankaŭ la finnan ŝlosilon! Jam longe atendita ĝi fine aperis, kaj mi estas certa, ke ĝi estos akceptata kun vera ĝojo de ĉiuj samideanoj en nia lando.

La nomita ŝlosilo estas eldonita laŭ la Ĉefeĉa modelo, kvankam ĝi estas iom pli ampleksa ol la alilingvaj (28 pĝ. da teksto). Ĝi enhavas, krom mallonga antaŭparolo, plenan gramatikon de Esperanto, kelkajn esperantajn ekzercojn kaj fine vortaron, konsistantan el ĉirkaŭ 2000 vortoj. La vortaro enhavas ankaŭ ĉiujn gramatikajn finiĝojn, prefiksojn kaj sufiksojn. Koncerne la gramatikon mi atentigas, ke la gramatikaj terminoj havas ankaŭ sian finnan nomon, por ke ili estu pli bone komprenataj. Entute la ŝlosilo estas tre zorge redaktita, kaj almenaŭ ĝis nun mi rimarkis nenian eraron en ĝi. Eĉ la preseraroj estas tre malmultaj kaj negravaj. Mi do volas varme rekomendi ilin al nia finna esperantistaro, citante fine la vortojn de S-ro de Beaufront: „*Havu ilin, konigu ilin, dissendu ilin*“.

La finna ŝlosilo estas eldonita de niaj samideanoj en Viipuri (Viborg) kaj ricevebla ĉe „Ilarejo Esperantista“, Helsinko. Ni esperu, ke ĝi baldaŭ estu aĉetebila ankaŭ en ĉiuj librojoj en Finnlando. Ĝia prezo estas nur 5 pennoj kaj pezo 5 gramoj.

E. Vokoso.

Patro nia. Ĥoro por Soprano, Aldo, Tenoro kaj Baso. Teksto kaj kompono de Johano Gothardo. Dediĉita al la III-a kongreso esperantista. Aĉetebla ĉe „Espero Katolika“, S-ta Radegonde (J & L.) Francujo. Prezo de la partituro kune kun la 4 apartaj voĉoj 60 Sd. — La verko, la 154-a de bone konata en Wien komponisto, membro de la „Esp. klubo Wien“, kiu eldonis ĝin pseŭdonime, estas vere inda dediĉaĵo kaj meritas plenan laŭdon. Abato Em. Peltier nomis ĝin belega kaj penadis kantigi la ĥoron dum la katolika Diservo en Cambridge per afabla helpo de S-ro Josee Quivy. La aliigita en kelkaj punktoj teksto ŝajnas unuarigarde stranga, sed post iom da pripensado oni ekkonas, ke profunda senco kuŝas en la nekutimaj vortformoj. „Espero Katolika“ prezigis la komentario donitan de la aŭtoro. Ni povas bonkonscience rekomendi al ĉiuj muzikamantoj tiun ĉi gravan verkon. La eldono havas oportunan formaton kaj estas tre bone presita.



GAZETOJ ESPERANTISTAJ.

Specialaj Gazetoj.

Juna Esperantisto, monata gazeto por junuloj, instruistoj kaj Esperantolernantoj, 8 paĝoj (18×22), nur en Esperanto. Jara abono: 2,50 fr. (1 sm.). Administracio: *Preso Esperantista Societo*, 33, rue Lacépède, Paris.

Lingvo Internacia, monata centra organo de la Esperantistoj, 48 paĝoj (13×20 cm.), nur en Esperanto. *Literatura aldono*. 16 paĝoj. Jara abono: 7 fr. 50 (3 sm.). Administracio: *Preso Esperantista Societo*, 33, rue Lacépède, Paris.

La Revuo, monata literatura gazeto kun la konstanta kunlaborado de D-ro Zamenhof, 48 paĝoj (16×24), nur en Esperanto. Jara abono: Francujo 6 fr. (2.40 sm.); ekster Francujo 7 fr. (2.80 sm.). Administracio: *Hachette & K^o*, 79 Bd. St-Germain, Paris.

Tra la Mondo, monata tutmonda revuo kun multaj ilustraĵoj (22×28), nur en Esperanto. Jara abono: 8 fr. (3.20 sm.). Administracio: *Gazeto Tra la Mondo*, 15, Bd. des deux Gares, Meudon (S.-et-O.). France.

Naciaj Propagandaj gazetoj.

Afrika Esperantisto. — Senpaga. 4, Rue eu Marché. Alger, Algérie. Por afrikaj samideanoj.

Bohemujo: *Časopis Českých Esperantistů*, monata organo de l'Bohemoj, en Boh. kaj Esp. lingvoj; jare, Fr. 3,75, (en Aŭstrujo) K. 3. Administracio: *Praha II*, 313.

Granda Britujo: *The British Esperantist*, oficiala monata organo de B. E. A. en Angl. kaj Esp. lingvoj;

jare, ŝ. 3 (Fr. 4); Oni abonas ĉe la Sekretario de la B. E. A., 13, Arundel Street, Strand. London.

Hispanujo: *La Suno Hispana*, oficiala monata organo de la H. S. P. E. en Esp. kaj Hisp. lingvoj; jare, Fr. 3. Direktoro-Administranto: A. Jimenez Loira, Avellanas 11, Valencia.

Meksiko: *Verda Stelo*, monata organo de centr. Meksika Esperantista Societo, en Esp. kaj Hisp. lingvoj. Jare Doll. 1: —. Adm. D-ro A. Vargas, 3:a del Relox N^o 12. Meksiko.

Rusujo: *Ruslanda Esperantisto*, oficiala monata organo de „Espero“, en Rus. kaj Esp. lingvoj; jare, R. 3 (Fr. 8.); ĉe S-ro *Espero*, B. Podjačeskaja 24, St-Peterburgo.

Svedujo: *Esperantisten*, en Sved. kaj Esp. lingvoj; jare, Kr. 2.50 (Fr. 3,50). P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm.

Unuigitaj Ŝtatoj: *Amerika Esperantisto*, monata revuo en Esp. kaj Angl. lingvoj. Jare Doll. 1: — (Fr. 5:10). Administracio: 1239 Michigan Avenue, Chicago.

ANONCOJ

FINNAJ ESPERANTISTOJ!

ATENTUI

Ĵus areris

Esperanto-avain

Ricevebla ĉe „Ilarejo“.

Prezo po 5 pennoj (afr. 10 p.); 10 ekz. afr. 60 p.; 25 ekz. afr. Fmk. 1:30; 50 ekz. afr. Fmk. 2:50; 100 ekz. afr. Fmk. 4:85.

Hospits

Kristana loĝejo por vojaĝantoj.

HELSINKI — VUORIK. 17.

— Telefono 34 24. —

Plej bona kristnaska donaco

al Esperantistoj estas la poŝhorloĝo „l'Espero“. La prezo de la poŝhorloĝoj, senditaj al hejmo, estas nun po 26 markoj, pli frue po 30 m. Abonante la poŝhorloĝon de ni, vi ricevos ĝin plej rapide kaj je la sama prezo, kiel abonantoj de „Tra la Mondo“.

Kelloseppä W. & O. Kinos.

Tampere
Kortelahdenkatu 12.

Finnaj Esperantistoj!

Ĉiujn poŝtkartojn tuj respondos

Marshall White
224 Water Street
Evansville, Indiana U. S. A.